No. 5. 1933. 31. XII.

# BULTENO

## DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

*Redakcio kaj administracio: Praha XIX., Uralské nám. 447. Telefona n-ro 718-41.*

*Redaktas: Dr. ST. KAMARYT Dr. A. PITLÍK*

*Senpage por membroj de Ĉs. Asocio Esperantista. Aperas sesfoje dum la jaro.*

## Eksterregula ĝenerala kunveno

okazis 9. XII. en Praha en kafejo Louvre. Daŭro: 20·40—0·30. Ĉeestis 50 membroj el 13 lokoj (Bakov n. J., Bratislava, Brno, Česká Lípa, Hradec Králové, Košice, Kutná Hora, Mladá Boleslav, Nymburk, Praha, Prostějov, Přelouč, Rumburk). Kiel gastoj ĉeestis delegitoj de Katolika ligo.

La punktoj de la programo estis:

1. *Necesaj aranĝoj pro aliĝo al UEA.* Post mallonga informo de la prezidanto la kunveno unuanime aprobis la aliĝon, efektivigitan de la komitato, kaj komisiis ĝin taŭgatempe publikigi la ciferojn de la novaj kotizoj. La novaj kotizoj enhavos samtempe kotizon por ĈAE kaj por UEA. Ankaŭ la legitimacio estos la sama. La kunveno tre insistas, ke estas devo de ĉiuj samideanoj esti membroj de la ambaŭ institucioj precipe nun, kiam la ofte postulata aranĝo pri unika kotizo estas efektivigita. Precipe ankaŭ, ĉar la nova aranĝo signifas por unuopulo ŝparon, ne grandan (3 Kĉ), sed tamen rimarkindan, ĉar ĉe niaj kotizoj temas ĉiam pri sumoj etaj.

2. *Ŝanĝo de statuto.* La prezidanto skizis la nekontentigan staton de la organizo en nia lando, se oni juĝas ĝin laŭ vidmanieroj de unuecigo kaj laborekonomio. Krom la du naciaj centroj ekzistas diversaj fakaj kaj ideaj grupoj, kaj entreprenoj, kiuj estas en orda rilato nek al la naciaj centroj, nek al organizo internacia. Tial la komitato decidis peti konsilon de la ĝenerala kunveno, ĉu la nuna momento taŭgus por turni sin al ĉiuj esperantistoj en Ĉeĥoslovakio kun peto decidi, ĉu ili volas eniĝi en Asocion, kiu laŭ sia statuto povos ampleksi ĉiujn esperantistojn de Ĉeĥoslovakio, estu ili de kiu ajn nacieco kaj havu ili specialajn interesojn fakajn, profesiajn kaj ideajn kiajn ajn. Por faciligi la prijuĝon kaj decidon la komitato ellaborigis projekton de la nova statuto. Tiun laboron faris komitatano s-ro Josef Friedrich el Košice.

Jozefo Friedrich, fervoja konsilisto en Košice, legas la projekton de la nova statuto. Ĝiaj principoj estas: Esperantistoj estos organizitaj denove individue kaj ĉiu membro estos samtempe ano de UEA. La membroj estos dividitaj en sekciojn laŭ siaj naciecoj. La *sekcioj* estos estrataj de komitatoj, elektataj de ili mem kaj sidantaj en urbo, elektita de la sekcio. Divido de la anoj en la sekciojn okazos aŭtomate laŭ ilia nacieco, kiun indikis la membro ĉe sia aliĝo. La sekcioj gvidos la propagandan laboron en sia lingva sfero en la tuta respubliko. *Lokaj grupoj* estas fondataj ĉie, kie estos minimume 10 membroj. La lokaj grupoj havos rajton krei komitatojn distriktajn aŭ regionajn laŭ ilia bontrovo. La membroj, insistantaj pri problemoj fakaj, profesiaj, ideaj povos grupiĝi en *fakojn*, ankaŭ aŭtonomiajn. La reprezenton de la Asocio antaŭ neesperantista publiko kaj publikaj aŭtoritatoj havos centra komitato. Estos elektataj ĝiaj 12 anoj en ĝenerala jara kunveno kaj sendos en ĝin siajn delegitojn la sekcioj po unu por ĉiu komencita cento da anoj. Ankaŭ la lokaj grupoj rajtos sendi delegiton en la centran komitaton, sed nur por ĉiu finita cento da anoj.

Konsilisto Koutek proponis, ke la kunveno danku al s-ro Friedrich pro la bone kaj tre zorge farita laboro. Akceptita per aplaŭdo. La diskuto sekvinta temis pri jenaj principoj:

a) *Nomigo de la nova Asocio:* Dr. Pitlík ja kaj ĝen. sekr. Šustr pledis por nomigo Ĉeĥoslovakia Asocio Esperantista, kio ebligos konservi la konatajn kaj meritite glorajn mallongigajn literojn de la ĝisnuna ĈAE. Sklenčka proponis Asocio de Esperantistoj en Ĉeĥoslovakio, Staněk sen. Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovakio. La diskuton partoprenis krom la nomitaj Hromada, Koutek, Tarantíková, Sklenčka, Kožený, Weinzetl, Akopov, Heikenwälder, Friedrich. Por la duaj du titoloj argumentis la proponantoj, ke ili estos pli akcepteblaj por la germanaj esperantistoj, ĉar estas en ili pli klare esprimite, ke temas pri ĉeĥoslovakianoj de diversaj naciecoj. Kiam oni deklaris, ke definitiva titolo estos decidita (akceptita) nur en la fonda kunveno, la prezidanto balotigis pri la proponataj du principoj por la titolo, por havi informon pri opinio de la ĉeestantaro. Por la unua balotis 13, por la dua 29 p.

b) *Ĉu ni principe devas provi krei la novan, ĉiujn kunigantan asocion?* Argumentoj por tio estis diritaj jenaj: Estas malfacilaĵoj pri reprezento de nia landa movado antaŭ la fremdlandaj samideanoj. (Dr. Pitlík.) Ni estas la sola lando, kie ekzistas du naciaj centroj (Dr. Pitlík). Por unuecigo estos laŭsperte ankaŭ multaj germanaj esperantistoj en la respubliko (Heikenwälder). Ni klopodas por unuecigo ne pro prestiĝo sed por ebligi pli racian kunlaboron de ĉiuj bonvoluloj en nia lando (Sklenčka). Temas ne sole pri kunfandigo de ĈAE kaj GEL sed ankaŭ pri

kunigo de pluraj lokaj kaj regionaj grupoj kaj de fakaj societoj en unu centro. (Kamaryt, Friedrich, Šustr). Ĉu ne estas danĝero, ke nombro de germanoj superos tiun de ĉeĥoslovakoj? (Horáček.) Certe neniu volos malhelpi kreskon de germanaj membroj, tamen ankaŭ inter ĉeĥoslovakoj estas la movado tiom forta, ke la rilato inter la sekcioj respondos tre versimile al fakta rilato en la loĝantaro ĝenerale (Sklenčka). UEA havas rajton akcepti la ambaŭ asociojn (Weiskopf). Estas mirige, ke la GEL kaj REL ne vidigas intereson pri unuecigo (Šamla). Estas videbla ĝenerala interkonsento pri bezono krei unusolan Asocion; malfacilaĵo aperas nur, kiam oni volas efektivigi tiun idealan staton (Hromada). Nuna stato eĉ ne estas defendebla (Šustr). Kunigo devas rezulti el ĝenerala deziro, altrudo ne povas helpi (Bendová). Unuecigon devas ĉiu deziri (Tyl).

La prezidanto demandis, ĉu ĉiuj aprobas intencon provi la unuecigon sur bazo de la proponata statuto. Ĉiuj respondis jese.

3) *Publikigo de tiu decido.* Laŭ propono de s-o Sklenčka la prezidanto resumis principojn, diritajn kaj aprobitajn en la diskuto, kaj la kunveno komisiis specialan komisionon, turni sin al ĉiuj esperantistoj en Ĉeĥoslovakio per cirkulero, kiu klarigos principojn de proponata nova asocio kaj petos ilin, anonci sin kiel membroj. Se la resono de tiu alvoko estos kontentiga, la ĈAE disiĝos por transiri al la nova unusola asocio. Estis akceptita ĉiuvoĉe.

4. *Liberaj proponoj.* a) Ginz montris jam pretan ladan stacidoman tabulon. Ĝia aranĝo kaj prezo tre plaĉis. La prezidanto rekomendis intensan varbadon por mendoj. b) Sklenčka atentigis, ke el Germanujo estas sendataj propagandaj presaĵoj de la nova reĝimo sub aŭspicioj de la Germana Esperanto Asocio. Li rekomendas al la komitato esplori, ĉu respondas la neŭtralecon de nia organizo internacia, ke ĝia membro tion faru. Dr. K.

## Stacidomaj tabuloj

Foriras dum ĉi tiuj tagoj rekte al la stacioj kaj ni esperas, ke ili plenumos bone dum jaroj sian servon. Jen la stacioj, kiuj faros nun pioniran laboron, diskonigante per brila stelo verda la vivon de nia afero. Ni notas ilin laŭmerite en sinsekvo de venintaj mendoj. Post Praha la unua komprenis la gravecon de la afero Staré Strašnice kaj sekvis la stacioj: Zvolen, Kolín, Košice, Teplice-Šanov, Bakov nad Jizerou, Postoloprty, Brno, Užhorod, Lázně Bělohrad, Bratislava, Litomyšl, Bor u České Lípy, Georgswalde, Varnsdorf, Česká Kamenice, Česká Lípa, Police nad Metují, Lenešice u Loun, Kežmarok, Plzeň, Liberec, Lom u Mostu, Trutnov, Louny, Písek, Poprad-Velka, Vizovice, Turč. Sv. Martin, Žatec, Aš, Louka—Horní Litvínov, Hradec Králové, Třebechovice, Týniště nad Orlicí, Kladno, Mladá Boleslav (ĉiuj tri stacioj), Prešov, Pardubice, Nymburk, Rumburk.

Sekvu centoj da novaj stacioj! Ni plezure atendas mendojn (atentu afable la formulon en Bulteno nro 2 aŭ petu mendilon de ĈAE), kiujn ni nun rapide plenumos, havante la tabulojn pretaj kaj bonan sperton pri ĉiuj preparaj laboroj. Ekspedo okazos ĉiam, kiam kolektiĝos ia kvanto da novaj mendoj. Tabulojn sen adreso por klubejoj ktp. ni ekspedas poŝtrevene.

Ni rekomendas al la mendintoj, ke ili — se ili tion trovas necesa — interkonsentiĝu nun kun la stacidoma oficisto pri la loko, kie ili deziras la tabulon havi. Ili atentigu la oficiston pri nova tiurilata dekreto de fervoja ministerio nro 46.884/33-III/3 de 29. X. 1933, kiun dissendis la ministerio laŭ nia peto al ĉiuj fervojaj direkcioj de la respubliko.

Malgraŭ niaj insistaj petoj sendis al ni iuj samideanoj tekston longegan, kiu apenaŭ trovis spacon sur la tabulo. Eĉ mallongigita ĝia pentro kostis multon. Ni petas denove la mendintojn, kiuj petis tekston pli ol 5-vortan, ke ili sendu nun al ĈAE per blankopagilo pliajn 5—10 Kč. Kiu ne pagis ankoraŭ la tabulon, bonvolu tion senprokraste fari!

Kaj nun: Denovan dankon al la kuraĝuloj! Kaj vivu sekvantoj! Ni raportos pri ili en venontaj Bultenoj. O. G.

## II. Prelegvojaĝo Kola Ajayi.

Dum malsano de s-o Ajayi amasiĝis multaj invitoj el balkanaj landoj. Nun li estas tre okupata. Ni eĉ kelkfoje perdis kontakton kun li. Sekvo de tio estas, ke ni bedaŭrinde devas anonci novan minimume kvaronjaran prokraston de liaj paroladoj en nia lando. La multaj invitintoj bonvolu nin afable pardoni. Ili pacience atendu niajn sciigojn, kiujn ni dissendos tuj, kiam ni havos ilin. Š.

## Haĝi Mustafa Raden.

Antaŭ kvar jaroj vizitis Esperantistan Klubon en Praha hometo de videble orientala deveno. Dio mem scias, kiel li venis inter esperantistojn. Sed en Praha oni lin esperantigis. La esperantigo okazis tiel rapide, ke post unusemajna restado en Praha li jam kuraĝis antaŭ multnombre kunvenanta esperantistaro aranĝi sian unuan esperantan paroladon pri sia vojaĝo. Li estas el Java, insulo en Nederlanda Hindujo, kaj li multon rakontis ankaŭ pri siaj intencoj. Poste li malaperis, kaj nur antaŭ nelonge li ree vizitis „sian gepatran klubon" en Praha. Li venis nur por mallonge rakonti pri siaj vojaĝoj tra multaj ŝtatoj eŭropaj, afrikaj kaj tiuj de Malgranda Azio. El tiuj vojaĝoj li revenis kiel „Haĝi", kiu titolo al li rajte apartenas, ĉar li estas mohametano kaj vizitis Mekkon! En dua sia parolado pri „Java, ĝiaj

popoloj kaj kutimoj" li rakontis aferojn vere interesajn kaj preskaŭ nekonatajn. ĈAE tuj proponis liajn paroladojn al kelkaj lokoj, kiuj kuŝis survoje de lia vojaĝo. Ni volis morale subteni provincajn klubojn, sed bedaŭrinde neniu akceptis, kelkaj eĉ ne respondis. Nia movado kutime dum somero vivas nur en Praha, kie la klubo kunvenas ĉiam kaj ĉiam en sufiĉe granda nombro. En ceteraj lokoj ofte oni ne kunvenas. Malgraŭ neakcepto de niaj proponoj flanke de E. K. en Hradec Králové, ni tamen sendis s-on Raden en tiun ĉi lokon, kredante, ke lertaj tieaj laborantoj certe ne preterlasos tiel malofta okazon de propagando por nia lingvo. Kaj vere ni ne eraris. Jen legu karaj legantoj, kion skribas al ni Klubo el Hradec: „Ni kore dankas al Vi, ke Vi malgraŭ nia letero sendis s-on Mustafa en Hradec Králové, ĉar li estis tre utila en propagando de esperanto en nia urbo... Kvar paroladoj (en la E. Klubo, Jednota českobratrská, YMCA) de s-o Raden estis interesaj kaj ĉie tre plaĉis. Tial ni bedaŭras, ke li ne venis komence de venonta monato, ke ni povu fari pli grandan „bruon" en publika parolado. Krom tio ni vizitis kun li kelkajn instituciojn kaj ĉie ni havis okazon propagandi esperanton." —

Dum fino de januaro kaj komenco de februaro ni volus efektivigi prelegojn de hinda esperantisto, s-o *Haĝi Mustafa Raden el insulo Java,* kiu paroladas kun lumbildoj pri belaĵoj de insulo Java kaj Bali, pri ĝiaj popoloj kaj iliaj moroj, kutimoj, familia vivo, religio, superstiĉoj, pri iliaj virinoj kaj infanoj, pri poligamio, pri orientaj lingvoj ktp. S-o Raden kun granda sukceso paroladis jam en kelkaj lokoj en nia lando, sed tiam ankoraŭ sen lumbildoj. Nun liaj paroladoj promesas esti des pli belaj kaj interesaj. Ni varme ilin rekomendas al ĉiuj esperantistoj, kulturaj societoj, lernejoj ktp. Kondiĉoj estos la samaj kiel ĉe prelegoj de K. Ajayi.

Ĉar la promesita prelegvojaĝo do Kola Ajayi en proksimaj 3—4 monatoj ne povas efektiviĝi, ni varme rekomendas inviti anstataŭ li la hindan samideanon Haĝi Mustafa Raden, kaj post kelkaj monatoj aranĝi prelegon de alia ekzotikulo, nome de Kola Ajayi.

J. Šustr, ĝen. sekr. de ĈAE.

---

## Kelkaj datoj pri la movado el la unuaj jaroj de la Respubliko.

1918: 5. XI. Fondo de „Informa Servo" en kafejo „Union" (Praha). — 17. XI. Delegitoj de Esperantaj societoj en Plzeň ĉe la ministro de instruado Habermann.

1919: 7. I. Fondo de „Rondeto de esperantistinoj" (Praha). 17. I. Traktado de la „Konstanta komitato de ĉeĥaj esperantistoj" pri kuniĝo de la du ĉeĥaj centraj Esperanto-asocioj. — 19. III. Fondo de „Biblioteko de La Progreso" (Plzeň). — 9. IV. Reprezentantoj de la „Konstanta komitato" (dir. J. Eiselt, dr. S. Kamaryt) prezentas 3 petojn al ĉsl. ministro de instruado. — 14. VI. Morto de Josef Grňa, tradukinto de Rakontoj de Arbes (unua libro de esperanta traduko el ĉeĥa literaturo). — 18. VII. Morto de MUDr. S. Schulhof, eminenta esperanta poeto en Pardubice.

1920: 1. II. Fondo de „Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista" (ĈAE) en Praha. — Junio. Propono de ĈAE al ministerio de instruado pri Esperanto en mezaj lernejoj (dr. S. Kamaryt). — ĈAE invitas la XIII-an Universalan kongreson al Praha por 1921. — 29. VIII. I. labora kunsido de Orientbohemaj esperantistoj en Hradec Králové. — 29. IX. Konstituiĝo de „Loka Kongresa Komitato". — 24. X. II. kunveno de Orientbohemaj esperantistoj en Pardubice. — Fervoja direkcio en Olomouc rekomendas Esp-on. — 30. X. Dekreto de ministerio de instruado pri Ekzamena komisiono por Esperanto en lernejoj: oficialaj komisarioj Eiselt J., dr. Bischitzky (Praha), ing. Kroužil (Brno). — 12. XII. III. kunveno de Orientbohemaj esp. en Červený Kostelec. — Julio-Septembro. Speciala kurso de Ekzamena komisiono de ĈAE por kandidatoj de ekzamenoj.

1921: Januaro. Fervoja direkcio en Bratislava rekomendas Esp-on. 14. I. Deputacio ĉe ministro de instruado Šusta (Eiselt, Süsser, Taubmann). — 6. II. IV. kunveno de Orientbohemaj esp. en Ústí n. Orl. — 27. III. Dekreto de ministerio de instruado pri instruado de Esperanto en mezej lernejoj. — 3. IV. V. kunveno de Orientbohemaj esp. en Přelouč. — 15. V. Esperanto en lernejplano por Komercaj akademioj. — 26. VI. VI. kunveno de Orientbohemaj esp. en Hradec Králové. — 31. VII. — 6. VIII. XIII-a Universala kongreso en Praha. (Prezidanto: dr. S. Kamaryt, Bratislava, ĝen. sekretario: dr. Aug. Pitlík, Praha.) — 25. IX. VII. kunveno de Orientbohemaj esperantistoj en Pardubice. — 30. IX. Unua oficiala aprobo al ĉeĥa lernolibro de Esperanto (J. Šupichová). — 11. XII. VIII. kunveno de Orientbohemaj esp. en Chrudim. — 18. XII. I-a regiona kunveno de Okcidentbohemaj esperantistoj en Plzeň. *J. Šupichová.*

---

## Radio. (Fino.)

Esperantajn horojn elsendis RJ Brno tri: la 1. III. „Amuza vespero" (konf. Th. Kilian), la 5. V. „Maja vespero" (konf. Th. Kilian), la 6. VI. „Moravio" (sonbildo, verkis kaj konf. s-ro J. Šamla). Krom tio RJ Brno elsendis en la monatoj oktobro-februaro 1932—33 ĉiusemajne dufoje po 10 minutoj esp-an kurson de Th. Kilian.

Vere ĝojiga estas la raporto pri la esp-a agado ĉe RJ Brno. Nia bona pozicio estas la rezulto de vere amika kunlaboro inter la parolantoj kaj la aŭskultantaro. Sen la efika subteno flanke de niaj eksterlandaj amikoj, certe estus veninta la tago, en kiu esperanto estus malaperinta el la radio-programo.

Estas klare, ke tiu ĉi bonega kontakto ne ekestis tuj post la unuaj paroladoj. Ili perdiĝis preskaŭ senehe en la aermaro. La unua, konvinkiga „amaso da leteroj“ alvenis multe pli poste, kiam ni promesis al ĉiu skribonto la broŝuron „Moravia Karsto“ kiel kompletigon al la aŭdita parolado pri la vidindaĵoj de ĈSR. La ĝojiga sekvo de tiu ĉi centvoĉa eĥo el preskaŭ ĉiuj ŝtatoj de Eŭropo estis ne nur la fortigo de nia pozicio, sed ankaŭ la grava decido de RJ Brno elsendi tutajn horojn esp-ajn. Per tiuj ĉi esp-aj horoj akiris Brno en eksterlando multajn fidelajn amikojn, aŭskultantajn regule niajn esp-ajn paroladojn kaj la muzikan parton de la programo. Sveda instruistino skribis: Ricevinte la radioprogramon, mia unua demando estas: „Kio nova en Brno?“ Tiu ĉi intereso pri Brno kaj ĈSR estas la plej bela rezulto de nia esp-a agado.

Sed amikoj, la saman subtenon ni ŝuldas al niaj samideanoj, laborantaj ĉe la eksterlandaj stacioj. Aŭskultu iliajn paroladojn kaj skribu! Per etaj sumetoj vi efike subtenas ilian laboron kaj fortigas nian movadon. Nenie vi povas utili per unu sola krono tiel, kiel ĉi tie. Skribu al ĉiuj ŝtatoj! Ne nur al la ŝtatoj, kun kiuj nin ligas amikaj sentoj. Ĝuste la poŝtkartoj el la aliaj ŝtatoj efikis plej forte, ĉar ili klare montris, ke esp-o estas ideo supernacia, kunliganta en amikeco ĉ i u j n naciojn.

Skribante al radio-stacioj, ne laŭdu kaj ne propagandu esp-on, sed menciu kaj substreku, kio vin interesis kaj plaĉis, notu, pri kio vi deziras aŭdi paroladon kaj sciigu, ĉu vi bone kaj klare aŭdis.

Brno fariĝis grava bastiono en nia paca batalo. Sed Brno volas fari pluan paŝon antaŭen. Ĝia celo estas tuteŭropa kunlaboro sur fundamento de esperanto. Ju pli multe ni subtenos niajn eksterlandajn amikojn, ju pli granda estos la nombro de tiaj apogoj, des pli frue ni atingos nian celon, des pli vasta estos la reto de radio-stacioj, kunligitaj en paca kaj kultura kunlaboro. Tiun ĉi celon ni atingos nur per via helpo — per via oferita eta sumeto!

Th. K.

## La VI. komitata kunveno

okazis la 8. XI. 1933 en Praha. Prezidis Dr. A. Pitlík. Daŭro de la kunveno: 20·30—24 h.

*Aliĝo al UEA.* Laŭ decido de la lasta komit. kunveno estis forsendita aliĝa letero al UEA, ICK kaj KR. Post tralego da la statuta projekto de nova UEA decidite rekomendi ŝanĝojn en senco, ke ĉiu ŝtato estu reprezentita en la komitato senescepte sole per unu nacia (ŝtata) societo kaj ke la akceptota societo havu minimume 100 anstataŭ 200 membrojn, plue ke en la estraro de UEA estu delegito de ĈAE, kiu posedu pro multaj membroj senpere aliĝintaj pluan duan komitatanon. — *Unuecigo de la movado en ĈSR.* Post debato pri tiu temo decidite kunvoki specialan komitatanan kunvenon por pridebati opinion de ĉiuj komitatanoj. — *Ĉsl. antologio.* S-o Hromada raportis pri la stato de la preparaj laboroj, citis la nombron kaj nomojn de aŭtoroj kaj de la verkoj tradukotaj. — *Gazeta servo*: dissendis 2 paĝojn da artikoloj al gazetoj kaj kunlaborantoj. — *Ila vojaĝo de Kola Ajayi*: Prelegojn mendis 14 lokoj. Pro malsano de Ajayi aranĝo prokrastita. — *Konferenco Wien—Budapest 1934*: S-o prez. dr. Kamaryt dum sia vizito en Wien detale informis pri tiu ĉi konferenco, okazonta en majo 1934 en Wien sub protekto de aŭstriaj kaj hungaraj eminentuloj.

## La VII. komitata kunveno

okazis la 28. XI. en Praha sub prezido de dro Pitlík kaj traktis nur pri temo: Unuecigo de la esperanta movado en Ĉeĥoslovakujo. Rezultoj de la debatoj estis senditaj al eksterprahaj membroj de la komitato kaj servis por preparo al la eksterregula ĝenerala kunveno.

# Movado.

**La XXVIa Universala kongreso** okazos la 4. — 11. VIII. 1934 en Stockholm. Adreso de L.K.K.: Fredsgatan 4, Stockholm. La kongreson oficiale invitis Sveda Trafika Asocio kun Sveda Esperanto-Federacio. La kunvenoj okazos en parlamenta domo. Fervoja rabato 25 % en Svedlando. Kotizo 25 sv. kr., frupagantoj (ĝis 31. III. 1934) 20 sv. kronoj.

**Kongresa jubilea libro pri la XXVa.** Okaze de la 25a Univ. Kongreso de esperanto aperis luksa libreto, enhavanta 24 priskribojn de la okazintaj kongresoj kun bildoj de la kongresurboj. La XIIIan en Praha interese priskribas redaktoro de „Heroldo“ Teo Jung, la IXan en Berno dro Pitlík.

**La universalaj kongresoj. Ĉu ili tro ofte okazas?** En la 7a nro de la organo de Norvega Esp. Ligo „Esperantobladet“ proponas s-o Alf Christensen, ke la universalaj kongresoj, por esti laŭnombre imponaj, okazu malpli ofte (ĉiam nur la trian jaron). Ĉiujare okazu, laŭ la proponinto, fakaj kunvenoj en konvenaj lokoj.

**Ign. Nitobe mortis.** En Kanado mortis antaŭ nelonge japana ŝtatisto Ign. Nitobe, kiu kiel vicsekretario de la Ligo de nacioj en la j. 1921 ĉeestis la XIIIan Universalan Kongreson de esperanto en Praha, post kiu li — konvinkiĝinte pri taŭgeco de esperanto kaj kolektinte dokumentan materialon pri internacia disvastigo de esperanto — kun dro Privat igis, ke la Ligo de nacioj akceptis la konatan poresperantan rezolucion.

**Prof. Fr. V. Lorenz,** eldoninto de la unua ĉeĥa lernolibro priesperanta en la j. 1890, vivas en S. Feliciano, Rio Grande do Sul (Brazilo) kiel novesperantano (estinta antidano).

La 8. XI. 1933 en Chicago mortis **Dro. B. K. Šimonek**, pioniro kaj instruisto de esperanto en USA, iama membro de ĈAE. Al lia familio ni esprimas sinceran kunsenton.

**Hungara propagando per esperanto.** Hungaroj scias servi sian landon per esperanto. Ankaŭ la hungara poŝta administro komprenis la signifon de internacia lingvo kaj eldonis serion de artiste faritaj poŝtkartoj kun karakterizaj pejzaĝoj hungaraj kaj kun klariga teksto en Esperanto. — Ni petas niajn membrojn, ke ili bonvolu direkti al „Ĉefdirektoraro de la Hungara poŝto, Budapest II., Krisztina körut" siajn gratulojn pri tiu trafa uzo de internacia lingvo.

**Biblioteko de Ĉs. esperanto-instituto** estis pliriĉigita per donaco de s-ino M. Krausová, vidvino je konata esp. pioniro Vojtěch Kraus, magistrata oficisto en Praha, kies bibliotekon s-ino Krausová transdonis al Ĉ. E. I.

---

# Lokaj informoj.

**Praha: Esperantista Klubo, Národní tř. 20.** 6. IX. Estis malfermita kurso por progresintoj kun 20 personoj, aranĝata unu horon antaŭ normala vendreda kunveno. Parolis gasto el Tallin (Estonio) s-ro Kritschman pri siaj vojaĝoj en aliaj mondpartoj. Post 10·30 h. ni aŭskultis esp. radio-programon el Brno. — 13. X. Prezidanto de klubo pri nove malfermita kurso por komencantoj kun 25 lernantoj. S-ro Staněk Fr., vicprezidanto de la Klubo, pri „Neoglifoj kaj esperanto". Viglan debaton partoprenis s-roj Baroch kaj Čech. — 20. X. S-ro Baroch kaj Staněk Fr. pri amuza vespereto kaj novaj programoj dum kunvenoj. Ĉeestis gastoj el Svedlando kaj Germanujo. — 3. XI. La programo estis pli riĉa, interese donis al ni s-ro Weiskopf la klarigojn pri nuna situacio de judoj, pri ilia skribo, moroj kaj pri nova hebrea lingvo. Al sama diskuto parolis s-roj Louda, Ginz kaj Šustr. — 10. XI. S-ro Čech pri programoj de niaj kunvenoj; lian projekton sekvis granda aplaŭdo. Radioĵurnalo Brno informas pri 5a esp. horeto. Pri bone sukcesinta esp. ekspozicio en Kralewska Huta raportis s-ro Ginz kaj pri nove projektata karavano al kongreso en Stockholm. S-ro Koutek invitas al pacifista kunveno en „YMCA". — 17. XI. Du novaj anoj de progresinta kurso pliriĉiĝis la programon, s-ino Turková deklamis belan poemon kaj s-ro Klímek „Kiel mi komencis lerni esp-on". S-ro Baroch informas pri radioĵurnalo Brno. S-ro Ginz pri Zamenhofstratoj kaj iliaj statistikoj ĉe ni kaj eksterlande. — 24. XI. Pri reorganizaj punktoj, rilatantaj nian nacian asocion, parolis kelkaj samideanoj. Ĉeestis kiel gasto s-ro Kaban unu el la malnovaj esp-istoj Plzeňanoj. — 8. XII. Kvankam estis la vizito iom pli malforta, ĉar multaj rezervis sian tempon al morgaŭa Eksterĝenerala kunveno de ĈAE, tamen estis vigle pridebatitaj kelkaj punktoj al la reorganizo. Ĉeestis nia konata laboranto s-ro Sklenčka, ĉefdelegito de UEA por nia respubliko, kiu mem donis siajn opiniojn al gravaj punktoj de reorganizo. Debatis s-roj Šustr, Ginz, Weiskopf, Staněk Fr. k. a. Pri novaj stacidomaj tabuloj, ledaj, emajlitaj parolis kaj al ni montris s-ro Ginz. Post la nova jaro la tabuloj devas pendi en ĉiuj niaj stacidomoj. — 15. XII. *Tago de la libro.* Malfermis prezidanto s-ro Šustr, ĉefan parolon donis la vicprezidanto s-ro Staněk Fr. Poste s-ro Čech tralegis kelkajn poemojn el „Hungara antologio". El ĉirkaŭ 100 ekspoziciitaj esp.-libroj multaj samideanoj aĉetis. S-ro Fürsl parolis pri nova Ĉe-metoda esp. kurso. *Staněk Mil.*

**Bratislava.** La klubo havis jaran kunvenon 25. XI. Estis elektitaj: prez. E. Wanitsek, vicprez. Vlado Jukl, sekretario P. Rosa, kasisto Jul. Klapita, protokolisto V. Kiss. La kunveno decidis aboni Heroldon por 10 jaroj je rabatita sumo da 500 Kč kaj donaci al la Asocia oficeja fondaĵo sumon da 300 Kč. (Ni tre dankas la klubon pro ĝia eminenta kompreno de niaj taskoj kaj atentigas je tiu ĉi ekzemplo.) Klubaj kunvenoj okazas nun ĉiun sabaton vespere en ĝia ejo, str. Vydrica 16.

**Brno.** La katolika klubo komencis publikan kurson la 3. X.

**Hluk.** Fakinstr. s-ano Fr. Omelka gvidas dum vintro 1933-4 kurson por komencantoj. Fervora samideano pruvis, ke eĉ en vilaĝo, kia estas Hluk, oni povas dissemadi la noblajn ideojn Zamenhofajn. Oni bezonas sole bonan volon kaj iniciatemon.

**Jaroměř.** Esperantista klubo „Zamenhof" petas propagandmaterialon, intencante post la Nova jaro malfermi kurson. La klubo deziras esti kun ĈAE en plej amikaj interrilatoj.

**Kolín.** Propaganda publika parolado estis la 27. IX. vespere. Parolis prof. Kožený el Mladá Boleslav, ĉeestis 20 personoj. Kurso por komencantoj estis inaŭgurita la 3. X. por 7 p., por progresintoj la 4. X. por 8 p. La unuan gvidas s-o A. Grigar. la duan s-o Janda. Ankaŭ en komenco de oktobro en kadro de la Propaganda semajno la klubo dissendis afiŝojn pri la kursoj kaj parolado kun „Pojítko" al adresoj de ĉiuj iamaj interesantoj. En la lokaj gazetoj aperis informoj pri tiuj aranĝoj.

**Košice.** Kurson por studentoj de la realgimnazio gvidis dum aŭtuno 1933 s-o J. Friedrich; finis ĝin 30 p. Kurson publikan gvidis la sama nia vigla komitatano dum la sama tempospaco; tiun partoprenis ĝis fino 25 personoj. Krom per la kursoj la klubo partoprenis la Propagandan semajnon ankoraŭ per elpendigo de la afiŝoj, disvendo de la libroj (sume por 128 Kč), donaco al la Oficeja fondaĵo (la klubo 50 Kč, s-o konsilisto Friedrich 10 Kč).

**Liberec.** Post dujara paŭzo komencis en aŭtuno 1933 publika kurso por germanlingvanoj, gvidita por 8 gepartoprenantoj de dro Gruber.

**Moravská Ostrava — Mariánské Hory.** Pola popolkleriga societo aranĝis kurson, kiun gvidis s-o Jozefo Sedzimír por 19 p. dum martomajo 1933. — Kurso por ĉeĥoj estis depost 3. V. 1933, instruis per direkta metodo s-ano Sedzimír 25 partoprenantojn. — En aŭtuno 1933 gvidis kurson s-o J. Mazánek por 32 pers. en rest. Preis. — La eksterregula ĝenerala kunveno de la „Klubo de ĉeĥaj esperantistoj" estis la 23. V. Nombro da membroj atingis 60. La kunvenoj estas en Lidový dům ĉiun duan kaj kvaran mardon. En aŭtuno aranĝis la klubo du kursojn: s-ano Sedzimír instruas 20 p. en Mor. Ostrava, s-ro Slaný 18 p. en Vítkovice.

**Nymburk.** Kurson por komencantoj en aŭtuno 1933 gvidis s-o Jindřich Doubrava (15 p.), por progresintoj s-o Janoušek el Praha. La klubo havas 37 anojn.

**Orlová.** La klubo fondis kaj dediĉis „pokalon de esperantistoj" por piedpilkludantoj. La kluboj sportulaj en Ostrava-regiono vetludis pro ĝi unuan fojon dimanĉe 13. VIII., gajnis ĝin la Sportklubo de Fryštát. Kurson por komencantoj en printempo 1933 gvidis s-o Kobiela, partoprenis 30 p.

**Plzeň.** Lo klubo eldonis propagandajn ĉeĥlingvajn kartojn kun ampleksa teksto vokanta „Balotu por enkonduko de unueca internacia..." La klubo en kadro de la Propaganda semajno disponigis senpage, plejparte per librovendejoj, 3000 ekz. de tiuj poŝtkartoj al la neesperantista publiko. Dum la semajno pendis grandaj afiŝoj sur la ĉefaj afiŝejoj. La klubo pruntas al interesantoj senpage la Benson-lernolibron po kajeroj, postulante sole garantion da 5 Kč por la kajero. La klubo kunvenas ĉiun sabaton en restoracio U nové pošty (Kramářovy sady 23). Krom ĝi kunvenas nuntempe ankoraŭ: Grupo de la Laborista Ligo en laborista domo Peklo ĉiun merkredon, laborista societo Kulturo ĉiun vendredon en restoracio U Hanů (V.), Germana E-societo ĉiun lundon en Deutsches Haus, klubo Škvrňany en rest. Na vršíčku, ĉiun lundon. En autuno 1933 estis kursoj: de la Laborista grupo en Peklo, du por komencantoj, por 21 kaj 10 partoprenantoj; sportklubo Škodovák 12 partoprenantoj; Nýřany du kursoj por kune 50 partoprenantoj.

**Praha.** Klub malostranských esperantistů aranĝas publikan kurson por komencantoj depost 6. XI. ĉiun ĵaŭdon en restoracio Kasal.

**Prostějov.** Publika propaganda prelego de s-o A. Neužil estis aranĝita de la klubo la 19. XI. La preleganto klarigis ankaŭ sian instrumetodon kaj prezentigis 11 siajn gelernantojn el Neředín. La sukceso estis tre bona.

**Rychvald** ĉe Bohumín. Dum vintro 1932-3 kurso por komencantoj, gvidita de f-ino Adámková, instruistino.

**Staré Město.** Kurson por komencantoj dum vintro 1933-34 gvidas s-o Jaroslav Žák. Aranĝanto estas Čtenářský spolek. En la montrofenestro de sia vendejo ekspozicias s-o Žák de tempo al tempo esp. interesaĵojn, vekante tiamaniere intereson por Esperanto ĉe la preterpasantoj.

**Třebíč.** S-o Kilián gvidas kurson por 21 studentoj de la Komerca akademio.

**Uherské Hradiště.** Novaj horizontoj por grandskala disvastigo de nia movado estis malfermitaj en metropolo de Mor. Slovácko — Uherské Hradiště. Antaŭ nelonge fondita *Slovaka Esperanto-klubo* (SEK) aranĝis ĉi tie grandan Esperanto-ekspozicion, kiun solene malfermis la 28an de oktobro urbestro s-ro dro M. Garlík en belega salono de urbdomo. Lia parolado havas por ni grandan signifon, ĉar konvinkigas nin klare pri la komprenemo de nia agado kaj penado. La ekspozicio, distingiĝinta per tre varia materialo, vekis grandan intereson ĉe la publiko. Dum 2 tagoj (28.—29. X.) vizitis ĝin pli ol 800 personoj, el kiuj multaj esprimis sin tre favore pri nia ĉiam kreskanta movado. Dum vintra sezono 1933-4 funkcias en Uh. Hradiště 5 esp. kursoj kun entute 120 partoprenantoj. Versimile ne ekzistas ĉe ni alia urbo, kie estus vekita tia intereso por esperanto kaj kie estus samtempe tiom da kursoj. La kursojn gvidas fakinstr. f-ino H. Kořínková, fakinstr. s-ro J. Vlček kaj Ĉe-met. instruisto Dolfa Bartošík el Uh. Ostroh. Senĉesa propagando de ĉiuj, kiuj sekvas kun vera konvinko la grandajn ideojn Zamenhofajn, devas havi ĉiam pozitivajn rezultojn. Nur oni devas voli iri ĉiam antaŭen.

**Vodňany.** Publikan kurson por komencantoj dum oktobro-decembro 1933 gvidis s-o Josef Ploss el Č. Budějovice por 16 partoprenantoj.

---

# Kroniko esperantista en ĈSR.

**Ŝtataj ekzamenoj.** Praha. Ŝtatan ekzamenon pri espo faris kun tre bona rezulto la 13. X. 33 s-o instruisto Pavel Cahák, membro de ĈAE, el Skupice apud Postoloprty. Kiel ekzamena komisario funkciis dro Pitlík. — Bratislava. Ĉe ĉeĥoslovaka komisiono estis la 8-an de novembro 1933 ekzamenita s-ro Miloš Brunclík, instruisto de popola lernejo en Čachtice, kaj sukcesis eminente.

**Kurson por kandidatoj al ŝtataj ekzamenoj** pri esperanto aranĝos Č. E. Instituto en Praha (II., Křemencová 17) de januaro ĝis aprilo 1934. Aliĝoj ĝis la 10. I. 1934. Kotizaĵo 120 Kč. Prelegoj pri la ĉeĥa gramatiko, pedagogio, prilernejaj leĝoj kaj espo preparos la kandidatojn por la ŝtata ekzameno, okazonta dum aprilo 1934 en Praha.

**Ekspozicio de la tutmonda preso en Pardubice.** 8. X.—12. XI. 1933 havis belajn afiŝojn kun ĉefa teksto en ĉeĥa lingvo kaj kun tradukita

## NIA TERMOMETRO.

| Por la jaro pagis dum la jaro: | 1930 | 1931 | 1932 | 1933 | 1934 |
|---|---|---|---|---|---|
| 1930 | 172 | 117 | 1 | — | — |
| 1931 | 56 | 216 | 112 | — | — |
| 1932 | 2 | 13 | 253 | 65 | 2 |
| 1933 | 1 | 1 | 16 | 481 | 5 |
| | 231 | 347 | 382 | 546 | 7 |
| Honora membro | 1 | 1 | 1 | 1 | |
| Dumvivaj membroj | 3 | 3 | 3 | 3 | |
| | 235 | 351 | 386 | 550 | |
| El ili membroj de la Studanta sekcio | — | 15 | 12 | 30 | |

El la 550 pagintoj por 1933 estas 185 korporaciaj membroj. Dum la lastaj tagoj de decembro ni atendis ankoraŭ plurajn kotizojn. Skl.

---

teksto en kvar lingvoj laŭ jena sekvo: esperanto, angla, franca, germana.

**Kunveno de nordbohemiaj esperantistoj.** La oka estis 5-an de novembro en Trnovany kaj partoprenis ĝin 41 personoj el 15 lokoj. Post prelego de s-o Müller pri grafologio sekvis detala raporto de la prezidanto prof. Murath pri la nuna situacio de la movado en Ĉeĥoslovakio. Li pledis por pli intima kontakto de estraroj de la naciaj centroj kun la laborantoj ekster la sidejoj de la centroj. Laŭ li estus tre utile, ke la ambaŭ naciaj centroj kreu iun novan. La opinio de prof. Murath estis aprobita de la kunveno post diskuto, kiun partoprenis s-oj Krisl, Slanina, Šusacký k. a. La amuza parto poste sekvinta tre kontentigis la konferencanojn.

**Blinduloj.** Societo de ĉeĥoslovakaj nevidantaj esperantistoj en Praha (sekretario en Praha IX-181) aranĝis la 25. XI. en Klár-blindulejo amikan vesperon kun tre ampleksa koncerta programo (18 numeroj), kiun prezentis preskaŭ ekskluzive blindaj zorgatoj de la institutoj Klár kaj Dejl. Krom ili parolis prezidanto de la societo s-o Saska, redaktoro de „Aŭroro“ s-o V. Echtner, delegito de la societo s-o R. Bloch. Celo de la aranĝo estis ankaŭ ligi denove rilatojn kun amika kaj bonkora publiko, kaj la rezultato estis kontentiga ankaŭ tiurilate.

**Katolikoj.** Klubo de katolikaj esperantistoj en Praha festis en sia kunveno la 18. V. dek jarojn de sia ekzisto. Nia asocio estis ĉe la soleno reprezentita de nia vicprezidanto s-o Dr. A. Pitlík, kiu salutis la kunvenon en nia nomo.

**Radio.** Moravská Ostrava. 16. VI. prelegis pri Ĉeĥoslovaka eksporto s-o V. Slaný.

**Regiona Esperantista Ligo en Český Těšín,** kuniganta esperantistojn en Ostrava-regiono daŭris en sia labormetodo dum la tuta j. 1933. La ĝen. kunveno estis en Orlová 15. I. 1933; estis reelektita prez. s-o L. Krysta, sekretario J. Hladký, kasisto Skulina. Kunvenoj okazis ĉiumonate en diversaj lokoj de la regiono: Jablunkov (12. II.), Radvanice (26. III.), Karvinná (4. IV.), Český Těšín (14. V.), monto Čantorio (25. VI.), Frýdek (8. X.), Fryštát (12. XI.), Marianské Hory (17. XII.). La plej granda nombro de ĉeestantoj estis en Radvanice (140 p.) por muzika kaj kanta koncerto, al kiu oni invitis ankaŭ neesperantistojn. Dum pluraj kunvenoj oni diskutis pri starigo de memorŝtono en Český Těšín, kiun entreprenon oni ĝis nun ne sukcesis efektivigi pro diversaj malfacilaĵoj. La monataj kunvenoj signifas manifeston por nia movado, kies valoro ne estas kontestebla, ĉar ili krome helpas konservi ĉe la samideanoj la konscion pri ilia aparteno al la movado.

**Unuecigo de la Espo-movado en Ĉeĥoslovakio.** Teritoria oficejo de UEA dissendis en fino de decembro cirkuleron, rilatantan al la projektata unuecigo kaj enhavantan la balotilon. Kiu interesiĝas pri la projekto kaj ne ricevis la cirkuleron, skribu tuj al Universala E.-Asocio, Hradec Králové, 628a.

**Radioparoladoj de dro Kamaryt.** Radiostacio de Brno dissendos la jenajn paroladojn de la prezidanto de ĈAE: 23. I. (17·25—17·35 h.) ĉeĥlingve pri neebleco de enkonduko de la latina lingvo kiel helpa lingvo internacia, la 27. I. (17·15—17·25 h.) pri „Rilato de filozofio al esperanto“.

**Malgranda ĵamboreo en Slovakujo.** La XIIa Tutmonda tendaro de la Skolta esperantista ligo okazos de la 16.—31. VII. 1934 en la regiono de Tatry. La preparajn laborojn prizorgas la Esperanto-fako de la centro de Slovakaj katolikaj skoltoj (Bratislava, Kapitulská 18).

---

# Informoj.

**Esperantista vivo.** Al gesinjoroj Friedrich en Košice naskiĝis 25. X. 1933 filo Jozefo. Ni salutas novan civitanon ĝoje en la homara rondo kaj deziras al la gepatroj la plej grandan feliĉon.

**Prelego de ĈAE-prezidanto en Wien.** Dr. Stan. Kamaryt prelegis en kunveno de Aŭstria Esperanto-Asocio kaj Viena Esperanto-Unio la 18-an de novembro 1933 en Wien (kafejo Siller, Ora halo) pri „Aktualaj problemoj de la movado“. Li argumentadis, ke nuna tempo estas decida momento, ĉu la movado esp-ista ekzistos por venontaj jardekoj kiel internacia amikaro aŭ ĉu ĝi ekiros vojon, kondukantan al enpenetro en publikjurajn instituciojn kaj estos tiamaniere altrudata kiel ĝenerala ilo por ebligi senperan internacian komprenigon de neprivilegiitaj individuoj. Tial li trovas tre necesa organizi internacie kaj laŭ raciaj metodoj propagandon ĉe unuopaj nacioj. La prelegon aŭskultis tre atente la tuta ĉeestantaro (ĉ. 60 p.) kaj partoprenis poste la diskuton, kiu senescepte aprobadis la rekomedatajn vidmanierojn. La kunvenon prezidis kaj gvidis

prezidanto de la Aŭstria Asocio s-ro reg. konsilisto Steiner. Partoprenis la diskuton s-roj Frey, Ĉech, Zimmermann kaj aliaj.

**Felikso Zamenhof mortis.** En Varsovio mortis la 4. XII. 1933 la frato de la Majstro, Felikso Zamenhof, naskita 6. XI. 1868 en Bialystok, esperantista verkisto kaj membro de ICK. En ĉiuj liaj verkoj videbliĝas la celo: unuigo de la interbatalantoj; ankaŭ dum la vigla kongreso en Parizo li helpadis la pacigon, montrante per siaj vortoj „Ne ĉiuj vojoj gvidas al Romo, sole la bonaj" la direkton al la reorganiza penado. La redakcio de la „Bulteno" esprimas al la Zamenhofa familio sinceran kunsenton.

**Naskiĝtago de la Majstro.** La 15an de decembro oni festis la 74 jaran datrevenon de la naskiĝtago de Dro. L. L. Zamenhof, naskita la 15. XII. 1859 en Bialystok.

---

# Ricevitaj libroj.

*E. Dahl: Dialogoj kaj komedietoj.* Eld. Soc. Esperanto, Stockholm. 32 pĝ. 12 x 18·5 cm. Prezo: sved. kr. 0.50. Aro da skeĉoj por amuzigi la vizitantojn de grupaj kunvenoj.

*Alois Schneider—Magda Carlsson: Barbro kaj Eriko.* Eld. Soc. Esperanto, Stockholm. 40 pĝ. 13·5 x 20 cm. Prezo: sved. kr. 0·60. Legolibreto de nova tipo, leteroj de la du junaj geesperantistoj kun ilustraĵoj el Aŭstrio kaj Svedujo.

*Santander*: Teritorio, historio, kutimoj, k. a. Aranĝita de J. Mangada-Rosenörn. Eld. de Hispana Esperanto-Asocio helpe de la Nacia Patronaro por Turismo. 128 pĝ., 13·7 x 19·3 cm. Prezo 2 sv. fr.

*H. Fischer*: La fabelo pri la granda turo kaj la malgranda doktoreto sekvata de aliaj konvinkigaj rakontetoj. Eldonis Esperanto-Centro Rumana, Bukaresto, Str. Dr. Istrate 10. Prezo 10 cent. svisaj.

*Jul. Šupichová: „Esperanto", mluvnice a cvičebnice pro samouky a kursy*, IV. eldono. Eldonis Šolc a Šimáček en Praha, 128 pĝ. Prezo 10 Kč.

*Novaj propagandaj flugfolioj: J. Filip, Mezinárodní řeč a katolíci*, 4 pĝ., 1 ekz. 10 h. Alojz Macek, Esperanto a skauting (en slovaka lingvo).

*Jarlibro de Tutmonda Asocio Kolektanta (TAK)* por 1932—33. Kompilis Dr. J. Takács, prezidanto de TAK. Prezo —·60 sv. fr., por membroj de TAK senpage. Mendebla ĉe kasisto s-o F. V. Mizera, Jablonné n. Orl. — Sur 32 paĝoj estas priskribita la celo de esperanta organizaĵo por kolektantoj, ĝiaj reguloj, interna aranĝo kaj agado. La listo de membroj kompletigas la por ĉiu kolektanto tre utilan publikaĵon.

*Paul Nyssens: Bonhumoro.* Laŭ la originala franca verko esperantigis la aŭtoro mem. 173 pĝ. Prezo 3 belgoj. Eldonis la aŭtoro, Bruxelles, Rue Froissart 129.

*Moraviaj esperanto-pioniroj en Olomouc* (Riegrova 17) eldonis en la j. 1933 la jenajn librojn: *L. Vladyka „Mi en li"*, kriminalromano. 19x14, 194 pĝ., bind. 300 gr. 26 Kč. — J. Sumín - R. Svobodová: *„Du noveloj"*. 19x14, 84 pĝ., bind. 200 gr. 13 Kč. — Eldonota: *Dr. St. Kamaryt „Filozofia vortaro"*. 18x13. 170 pĝ., bind. 180 gr. 28 Kč.

*Presisto kaj kliento.* Kelkajn koncizajn konsilojn al tiuj, kiuj rilatas kun presejo. Pĝ. 16. Eldonis Esperanto-presejo kaj eldonejo de Ant. Pražák, Jablonné n. Orlicí, ĈSR. Por interesantoj senpage.

*Glumarkoj*, propagandantaj esperanton kaj pacon, estis eldonitaj de la Esperantistaj grupoj en Zaragoza. Mil ekz. afrankite por antaŭpagitaj 1.60 pesetoj (Kĉ 4·50) sendas Esp.-grupo Frateco, Str. Roda 14—16, pral. Zaragoza (Hispanio).

---

## Mendu, uzu kaj disvastigu la eldonaĵojn de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista:

| | |
|---|---|
| Bouška, *Krátký kurs esperanta* | Kč —·50 |
| *Šlosilo*, ĉeĥa | „ —·60 |
| „ slovaka | „ 1·— |
| Šupichová, *Rádce českého esperantisty* | „ 2·30 |
| Collinson, *Esperanto a jeho kritikové* | „ 2·— |
| *Afiŝoj*, sur maldika papero, 1 ekz. | „ 1·70 |
| sur kartono | „ 2·— |
| Bouška, *Esperanto—jednotné jazykové pojítko národů*, 100 ekz. | „ 7·— |
| Ginz, *Jeden jazyk pro celý svět*, 100 ekz. | „ 20·— |
| *Poŝtkartoj kun skizo de mapo de Ĉeĥoslovakujo*, 100 ekz. | „ 15·— |
| *Ĉeĥoslovaka numero de Literatura Mondo* | „ 6·— |
| „ „ „ luksa eldono | „ 8·— |
| *Praha*, ilustrita gvidfolio | „ 1·— |
| *Unua slovaka kristana princo* | „ 1·— |

Al indikitaj prezoj aldonu 10% por ekspedkostoj. Konto de poŝta ŝparkaso 9.602 Svaz čsl. esperantistů, Praha XIX., Uralské nám. 447.

---

**Esperantista Klubo en Praha II., Národní 20 a**

ekspedas por antaŭa pago (en poŝtmarkoj):

1) serion de foto-poŝtkartoj kun 6 belaj diversaj bildoj de Praha kun esp-a teksto, por . Kč 4·10
2) poŝtkartojn kun lasta portreto de Zamenhof, 10 pec. . . . Kč 3·50
3) rondan esp. insignon (indiku ĉu pinglon, butonon aŭ broĉon) por . . . Kč 5·—

Vychází 6krát do roka. — Vydavatel: Svaz čsl. esperantistů v Praze XIX., Uralské n. 447. — Zodpovědný redaktor Fr. Slavík. Tiskne A. Pražák, Jablonné n. O. — Novinová sazba povolena Ředitelstvím pošt a telegrafů v Praze, č. 102 047-VII-1933.